# *Rifuzas Nikaragvo ekskludi Venezuelon el la Pintkunsido de la Amerikoj.*



Havano, 22 feb (RHK) La prezidento de Nikaragvo, Daniel Ortega, rifuzis la vetoon altrudatan kontra? Venezuelo neglektante la eblecon al tiu ?i lando partopreni la pintkunsidon de la Amerikoj, kiu devos sesii la 13-an kaj 14-an de aprilo en Lima, Peruo.

Ortega emfazis ke tiu decido perfortas ?iujn rezoluciojn kaj principojn starigitajn en la ?arto de UN (ONU) kaj trarompas  la suverenecon de la latinamerikaj landoj.

Dum ceremonio oma?e al mortodatreveno de la nikaragva gvidanto Augusto César Sandino, la ?tatestro konfirmis sian sintenon kontra? la agresoj impulsataj de fremdaj potencoj kaj kelkaj registaroj de la regiono kontra? Venezuelo kaj Kubo.

Ortega atentigis pri tiuj kiuj volas dividi la latinamerikajn popolojn, kaj elstarigis la gravecon de la Latinamerika integri?o, kun la celo atingi sukcesojn favore al evoluigo latinamerika, spite al la ideologiaj diferencoj ekzistantaj inter la registaroj.

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/155782-rifuzas-nikaragvo-ekskludi-venezuelon-el-la-pintkunsido-de-la-amerikoj

**Radio Habana Cuba**